


trimestriel  
1er trimestre  
2013

# LA INFORMILO

N° 161  
31 mars  
2013



l'esperanto  
la langue de l'amitié  
sans frontières



esperanto  
France-Est



esperanto  
la lingvo de l'amikeco  
sen landlimoj

## ESPERANTO FRANCE-EST

association culturelle  
pour la promotion  
de la langue  
internationale

### ESPERANTO

regroupant  
les départements

Bas-Rhin (67)

Haut-Rhin (68)

Meurthe-et-Moselle (54)

Meuse (55)

Moselle (57)

Vosges (88)

Maison des Jeunes  
et de la Culture

"Philippe Desforges"

27, rue de la République

FR - 54000 NANCY

### ABONNEMENT / ABONO

annuel / jara

15 €

eksterlando

18 €

## ... sur les pas de Ligier Richier ...

Ayant conservé au cours des siècles ses anciennes caractéristiques, l'abbaye de Benoîte-Vaux ( 55 ), reconvertie en centre d'accueil culturel et touristique, avait invité les participants du 73<sup>ème</sup> stage-rencontre international de l'association *Esperanto France-Est* et de son homologue, la *Baden-Virtembergga Esperanto Ligo* \*\*.


Programme véritablement éclectique pour animer une fin de semaine dédiée à la pratique multifacette de l'esperanto... Cours multi-niveaux, conférence-débat sur le thème de la littérature originale et de ses auteurs, visite-découverte de la ville de St-Mihiel, un des berceaux des œuvres magistrales de Ligier Richier, le grand sculpteur de la Renaissance, sans omettre la soirée-détente au cours de laquelle la jeune chanteuse esperantophone Marie Lieby fit montre de son talent vocal... et « instrumental » !

Il convient de souligner la présence impressionnante du service de librairie de l'association, offrant aux stagiaires près de six-cent ouvrages !

Le service hôtellerie n'a pu que rallier tous les suffrages de satisfaction, non seulement des alsaciens et des lorrains, mais aussi des « voisins » d'Allemagne, de Belgique, du Luxembourg, des Pays-Bas... et même d'Angola !

C'est la ville de Speyer qui accueillera, du 18 au 20 octobre prochain, la rencontre automnale couplée du 35<sup>ème</sup> séminaire de la « BAVELO »\*\* et du 74<sup>ème</sup> stage-rencontre d'*Esperanto France-Est*.



<b>Espéranto France-Est</b>		<b>Orient-Franca Esperanto-Asocio.</b>
<b>La Informilo</b>	Bulletin bilingue d'information sur la langue internationale <b>ESPERANTO</b>	Dulingva inform-bulteno pri la internacia lingvo <b>ESPERANTO</b>
<b>Rédaction:</b> <b>Redaktoro:</b>	<b>PoI DENIS, 5, Chemin de Blamecourt, 55000 BAR LE DUC</b>	
	poŝ-tel. 06 98 09 62 81	pol.denis@orange.fr
Les articles à insérer doivent parvenir impérativement à la rédaction dans les délais suivants:	Article manuscrit Texte envoyé par courriel Document avec mise en page	un mois 3 semaines 2 semaines avant la fin de chaque trimestre
Les articles signés nommément par leurs auteurs expriment la seule opinion de ces derniers.		

Komitato de la Asocio		Comité de l'Association	
Funkcio	Adreso	telefono	Ret-adresoj
Prezidanto + PKK <i>Président + Cours par correspondance</i>	S-ro Edmond LUDWIG 26, route de la Schlucht 68140 STOSSWIHR	03.89.77.52.56	esperanto.eludwig@orange.fr
Sekretario <i>Secrétaire</i>	S-ro Robert KUENY 30, rue des Champs 68690 GEISHOUSE	03.89.82.37.62	kueny.robert@neuf.fr
Vic-sekretario <i>Vic-secrétaire</i>	S-ro Jacques HERLÉ 1, chemin du Berger 57380 MAINVILLERS	03.87.01.00.39	jacques.herle@laposte.net
Kasisto <i>Trésorier</i>	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM	03.89.45.62.89	andreo.ag08@free.fr
Libroservo <i>Service Librairie</i>	S-ro Jean-Luc THIBIAS 37, rue Pierre et Marie Curie 54500 VANDOEUVRE	03.83.53.57.54	thibias.jean-luc@wanadoo.fr libroservo.efe@wanadoo.fr
Redaktoro <i>Rédacteur</i>	S-ro PoI DENIS 5, Chemin de Blamecourt 55000 BAR LE DUC	06.98.09.62.81	pol.denis@orange.fr
Aliaj komitatanoj	S-ino Liliane BERSWEILER	03.83.47.41.36	liliber54@yahoo.fr
Asesseeurs	S-ro Frédéric PORRETTI	03.69.77.07.24 06.15.70.15.73	popo68@evhr.net
	S-ro Roger DEGRELLE	03.82.21.92.40	roger.degrelle@wanadoo.fr
	S-ino Simone KIRY	03.89.57.68.10	jeanmarie.kiry@sfr.fr
	S-ro Cyrille HURSTEL	08.70.57.68.00	cyrille.hurstel@free.fr
	S-ino Ginette MARTIN	03.29.24.68.46	gimavo@wanadoo.fr
	S-ino Mireille ANTONI-TURCK	06.34.33.68.93	mirantur2@yahoo.fr
	S-ro Bertrand WICK	03.89.69.16.63	bertrand.wick@wanadoo.fr
	S-ro Alian Collignon	03.83.40.35.60	colli.alano54@orange.fr
<b>Abono al La Informilo →</b>	Francio: 15 eŭroj Eksterlando: 18 eŭroj	<b>← Abonnement à La Informilo</b>	
Pagoj per ĉeko je la nomo de →	<b>Esperanto France-Est</b>	<b>← Paiement par chèque au nom de</b>	
Pagoj per ĝiro al jena konto →	<b>CCP 1997 72 W NANCY</b>	<b>← Paiement par virement au compte</b>	
Bank- aŭ poŝt-ĉekoj sendataj al la Kasisto Adres-ŝanĝo: Informu al →	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM	Chèque bancaire ou postal ou changement <b>← d'adresse à envoyer au trésorier</b>	

## BULTEN-ENHAVO

- |                               |                                  |
|-------------------------------|----------------------------------|
| 1 Front-paĝo                  | 15 Esperanto/radio               |
| 2 Komitato/Artikol-listo      | 16 Viena muzeo/Scienco           |
| 3 Prezidant-angulo            | 17 Pri impresionismo             |
| 4/5 Staĝ-raporto              | 18 Nefermita letero              |
| 6 Konstanz/Lille 2015         | 19 Pri <i>Linguaforce</i>        |
| 7 Agad-raporto                | 20 Esperanto ĉe <i>Triballat</i> |
| 8 Festo de la lingvoj/ Lloret | 21 Neuchâtel/komputik-vortaro    |
| 9 Pied-itinero en Vogezoj     | 22/23 Anglalingva reklamo        |
| 10 Malkovro de Rumanio (2)    | 24 Libroservo                    |
| 11 Esperanto-kalendaro        | 25 Abonoj k Kotizoj              |
| 12 <i>Selten</i> /Veteranoj   | 26 Anekdotoj                     |
| 13 Justa komunikado           | 27 Distra angulo                 |
| 14 <i>Bruno</i> en Ĉinio      | 28 Fototeko                      |

ISSN 0291 6037 trimestriel

N° CPPAP : 0409 G 83517

bulletin d'information bilingue sur l'espéranto  
édité par l'association culturelle**Espéranto France-Est**

MJC PhiJippe Desforges – 27 rue de la République

**54000 NANCY**Directeur de la publication : **Edmond LUDWIG**Rédacteur : **PoI DENIS**Dépôt légal : **31 mars 2013***Imprimé par l'imprimerie de l'encre***55000 Hargeville-sur-Chée**

Estimataj gesamideanoj !



Ĉar la elekto de la dato de la ĉiujara *Ĝenerala Membrokunveno* dependas de multaj faktoroj, mi sekve ne scias, ĉu vi legos tiujn liniojn antaŭ aŭ post tiu rendevuo, sed mi ja konscias, ke la problemo, kiun mi intencas priparoli, tutmaniere ne trovos solvon tujan.

Jesja ! Rimarkeblas -ne nur en la Esperanto-asocioj- ke la nombro de la membroj, kiuj interesiĝas pri la mastrumado de asocio, nekredeble malgrandiĝas. Kutime la postulo de demokratio, de travideblo, de partopreno en la decidoj grandas, sed malgraŭe eblas konstati, ke la faktoj pruvas la malon.

Mi do tutmaniere lanĉas alvokon al partopreno en *Ĝeneralaj Membrokunvenoj*, kaj al kandidatiĝoj por la komitataneco. La estraranoj ja bezonas konsilojn kaj novajn ideojn ! Helpu, mi

petas !

Tiuj konstatoj de kelka tempo ankaŭ cerbumigas la respondeculojn de UEA. Mi memoras prelegon de Humphrey TONKIN, la longjara prezidanto de UEA, en kiu li klarigis, ke nun eble pasis la tempo de la asocioj, ke la homoj ne plu emas al aniĝo pagante al asocio, sed pretus pagi por fondusoj, kiuj laboras por pli tujaj projektoj. Eĉ en Esperantujo jam ekzistas tuta listo, kiun vi trovos en la reto. Mi citu kiel ekzemplojn *Esperantic Studies Foundation (ESF)* aŭ *E@I*.

Eble ni nun troviĝas je vojkruciĝo al novaj agadmanieroj. Ĉu ni jam maturas je tio ? Ĉu aperos inter ni novaj talentoj ? Mi mem ĝojus, se ideoj por projektoj tiaspecaj « ŝprucus » inter ni, eĉ se mi ne scias, ĉu jenas la solvo en regiona asocio. Mi ja estas kutimulo je asocioj !

Pour vous initier à la seule  
vraie langue internationale...

Pour vous perfectionner  
ou éprouver le plaisir rare de converser  
en espéranto !...

Pour profiter  
de nos stages, de nos rencontres,  
de nos congrès, de nos voyages ...

la solution:  
un cours personnalisé  
chez soi !



« SalutonKarin'  
- Saluton Petro !  
jen surprizo !... »



espéranto  
France-Est

rapidité ...  
efficacité ...  
deux maître-mots  
de notre cours  
par correspondance !

\*\*\* un matériel adapté  
\*\*\* une technique éprouvée  
\*\*\* un réseau d'animateurs performants  
\*\*\* un savoir immédiatement opérationnel



Edmond LUDWIG  
26, route de la Schlucht  
68140 STOSSWHIR  
Tél: 03 89 77 52 56

Une diffusion  
sur toute la région  
et au-delà !

Nous mettons à votre disposition le site internet de notre association **Espéranto France-Est**

<http://esperanto.alsacelorraine.perso.neuf.fr>

également accessible par

<http://esperanto.france.est.free.fr>

Plusieurs liens vous permettront de découvrir d'autres sites originaux en France et dans le monde. Notre rubrique "albums photos", complétée en permanence, vous offrira un panorama exhaustif original des événements régionaux et ... extérieurs !

## Sukcesis ja la 73a Regiona Staĝo de Esperanto France-Est en amikaj rilatoj kun BAVELO

Ĉiuj staĝoj organizitaj de *Espéranto France-Est* estas ĝenerale sukcesaj, kaj estas banale rediri tion. Tiu-ĉi staĝo ( BENOÎTE-VAUX, 15 / 17ajn de marto 2013 ) estis prizorgata de la *Grupo Esperanto-Meuse*, kiu malofte organizas, do tiu grupo preparis ĝin kun freŝaj fortoj, entuziasmo kaj granda sindonemo .

La nombro de partoprenantoj estis 43, inter kiuj ok germanoj, unu nederlandano, unu sviso, unu belgo, unu luksemburgano kaj unu angolano, kiu vivas en Colmar. Malfacilis krokodili !



La programoj estis tre interesaj. Vendrede vespere, post nia instalaĵo kaj bona vesper-manĝo, *Lydia Bloch* kaj *Catherine Kremer* rakontis pri Rumanio, kaj varbis por futura vojaĝo en aŭgusto. La promesita projekciilo mankis, sed la du prelegantinoj sukcesis kapti nian atenton per sia konvinka parolado. La projekciilo venos la morgaŭan tagon, kaj ni finfine povis spekti filmetojn pri Rumanio.

Sabate matene okazis turisma aranĝo en *Saint-Mihiel*. En siberia temperaturo, ni trairis la stratojn de la urbo, ankaŭ

vizitis du belajn preĝejojn, *Saint-Etienne* kaj *Saint-Michel*. Vere frostis. Varmigi la manojn apud la brulantaj kandeloj en preĝejo donis nur mi-



nutan plezuron ...

Sed tiuj preĝejoj entenas trezorojn, inkluzive la « entombigon de Jesuo » de *Ligier Richier*, sed ne nur. Tiujn trezorajn artaĵojn Catherine plivalorigis per siaj bonvenaj kaj interesaj komentoj. Ni iom forgesis la malvarmon ...

Revenante ĉe la kvieta gastejo , ni ĝuis denove bonan manĝon, kiu redonis fortojn.



Posttagmeze okazis la prelego de *Anne Jausions* pri esperanta originala literaturo. Mi devas komplimentis ŝin, ke ŝi alportis multe da libroj kaj fotokopioj por fari la prelegon tre kompleta. Ni devis unue skribi la liston de niaj plej ŝatataj aŭtoroj. Poste ŝi rakontis pri la tre ŝatataj de ŝi. Ĉiu el ni alternis por legi pecojn, ĝenerale vivajn, amuzajn aŭ emociigajn. Pro la entuziasmo

de Anne, mi notis multe sur mian kajereton, kaj metis asteriskojn sur la librojn, kiujn mi intencas iam (?) legi. Ve, mi devas pasigi tutan vivon, la originala, esperanta literaturo estas ege abunda !

Vespere ni ĝuis elstaran spektaklon. *Marie Lieby* ludas plurajn instrumentojn, kiujn oni malofte vidas en koncertoj, ekzemple diversajn sakŝalmojn kaj flutojn, kaj ŝi ege bele kantas kanzonojn tradukitajn en esperanto, jam konatajn, sed kiujn ni malkovras kun granda emocio. Tre talenta, jam vera



profesiulo ŝi estas malgraŭ ŝia juna aĝo. Certe futura stelulino !



Sekvis la knajpo por kiu volis kafumi aŭ bierumi.

Dimanĉe matene, Anne Jausions parolis al ni pri la hispana skolo de esperantaj aŭtoroj, kaj ni daŭre ĝuis la prelegon. Edmond Ludwig zorgis pri komencintoj. Laŭdire, li faris tre pedagogian kurson kaj paroligis ĉiujn lernantojn.

La libro-servo estis escepte riĉa kaj bone zorgata de *Jean-Luc* kaj *Micheline*. Ni ricevis abundan, tre belan dokumentaron pri Ligier Richier kaj la departemento Mozo.

Post la dimanĉa tagmanĝo, venis la momento de dankoj al responsuloj, kaj la kunvenoj de komitatoj ... kaj la disiĝo !



Se vi rigardas la fotojn de André Grossmann ĉe la adreso <http://esperanto.alsacelorraine.perso.neuf.fr>, kaj poste serĉas la rubrikon « *nos albums photos* » kaj « *Benoîte-Vaux* », vi vidos nur ridantetajn vizaĝojn...

Vere, tiu staĝo estis tre agrabla !

*Ginette MARTIN*



## marĝe de nia staĝo

### Francgermana amikeco jam antaŭ la Traktato de Elzeo ( 1963 )



Kortuŝiga estis la letero de nia germana samideanino *Irmgard BENGSCHE*, el Konstanz, kiu memorigis pri la komencaj rilatoj postmilitaj inter niaj germanaj kaj francaj najbaraj asocioj, ekigitaj de Sinjoroj *Michael SCHMIDT* kaj *Jean-Paul COLNOT*. La letero kaj la fotoj estis transdonitaj al Sinjorino COLNOT, kiu daŭre agadas por Esperanto.

Niaj legantoj, kiuj regas la germanan lingvon, malkovros kun plezuro historion kun fotoj de la translimaj kontaktoj inter EFE ( *Fédération Culturelle de l'Est pour l'Espéranto* ) kaj la grupo de Konstanz, en libro mendbla en ekstermovadaj librovendejoj :

*Die Plansprachen Volapük und Esperanto - Geschichte und lokale Ereignisse* (Hans-Dieter Kuhn)



## grava komunikado



**La nordfranca urbo Lillo (Lille) gastigos la 100-an Universalan Kongreson de Esperanto en 2015.** La Estraro de UEA decidis pri la loko de la jubilea UK en la lasta tago de sia kunveno, kiu okazis de la 22-a ĝis la 24-a de marto en Roterdamo. Inviton pri la okazigo de la 100-a UK en Lillo faris *Unuiĝo Franca por Esperanto, UFE*.

Lillo estas la ĉefurbo de la regiono, en kiu situas ankaŭ *Bulonjo-ĉe-Mar*. La urbo de la unua UK tamen ne havas la necesajn kondiĉojn por konsiderinde pli granda kaj ankaŭ laŭ sia programo alispeca evento ol tiu en 1905, dum la kongresejo *Lille Grand Palais* en la regiona ĉefurbo fariĝis populara ejo de plej diversaj grandaj kongresoj, foiroj kaj aliaj eventoj. Tamen, dum la 100-a UK okazos tuttaga ekskurso al la proksima *Bulonjo-ĉe-Mar*.

*Universala Kongreso de Esperanto* estas unu el la plej longedaŭraj kongresaj tradicioj en la mondo. Kvankam tiu tradicio komenciĝis en 1905 kaj do estos jam 110-jara en 2015, la jubilea UK en Lillo portos la numeron 100, ĉar dum la Unua kaj Dua Mondmilitoj UK ne povis okazi. La 100-an datrevenon de la unua UK oni festis per la 90-a UK en la litova ĉefurbo Vilno en 2005.

laŭ [www.facebook.com/Universala.Esperanto.Asocio](http://www.facebook.com/Universala.Esperanto.Asocio)



## agadraporto 2012

Bone funkcianta asocio ankaŭ ŝuldas la bonan funkciadon al la rutina laboro de siaj agantaj membroj. Rutinas do la afiŝado de la eventoj kaj diversaj informoj sur nia retpaĝaro

<http://esperanto.alsacelorraine.perso.neuf.fr>

fare de nia kasisto André GROSSMANN, rutinas la funkciado de nia libroservo fare de Jean-Luc THIBIAS, rutinas la produktado de nia bulteno « LA INFORMILO » fare de ties ĉefredaktoro ( kiu jam produktis 160 numerojn ... ) Helpas lin André GROSSMANN, Jean-Luc THIBIAS kaj Edmond LUDWIG. « LA INFORMILO », eĉ parte aperas kolore , kaj eldoniĝas je 250 ĝis 300 ekzempleroj ( la lasta numero eĉ tute kolore ).

La estraro ankaŭ kunlaboris kun la organizinto de la sukcesega printempa staĝo en *La Petite Pierre*, Berrand WICK. Elstare li sukcesis involvi neesperantistan asocion de lokaj poetoj, kiuj ĉeestis la distran vesperon kun la itala kantisto MANUEL, kaj prezentis siajn verkojn.



Esceptaj agaderoj ne multis ĉi-jare. Nia komitatano Alain COLLIGNON proponis eldonadon fare de la poŝto de poŝtmarko honore al la « 125-jariĝo de Esperanto ». Post komuna propono, elekto de taŭga bildo, estas finfine André GROSSMANN, kiu prizorgis la mendojn ... kiuj ne sukcesis pro rifuzo de la poŝtaj servoj eldoni poŝtmarkojn kun nefranca teksto (internacia lingvo), pro la leĝo TOUBON. Elturniĝis André GROSSMANN, kiu produktis etiketojn samaspektajn, kiujn li sendis al la petintoj kaj kiujn eblas ĝlui sur kovertojn.

Fervore reprovigis la dekanon de la « Fakultato pri Beletro, Lingvoj kaj Sociaj Sciencoj » de Mulhouse, Yann Kerdilles, funkciigi kurson en la Universitato de Alta Elzaso. Li organizis kunvenon sufiĉe bone vizititan, en kiu ĉeestis kaj estraranoj, komitatanoj kaj membroj de EFE kaj Cyrille Hurstel, kiu tie prelegis. Sed la minimuma nombro de 12 gestudentoj ne estis atingita.

Roberto KUENY enketis por trovi staĝejon por la printempa staĝo 2013 ( kiun li pretintus organizi en Elzaso ).

Ne eblis trovi staĝejon proksiman al lia loĝloko. Li do rezignis, sed sin pretigis transpreni la taskon François-Xavier Gilbert, en BENOÎTE-VAUX (55). Pri serĉado de la intervenantoj zorgis Edmond Ludwig. La aliĝilon redaktis kaj enretigis André GROSSMANN.

Nia dissendolisto ĉe Yahoo havas 77 membrojn. Ĉi-sube, statistikoj pri la interŝanĝitaj mesaĝoj

[Alzaco-Loreno@yahooGROUPES.fr](mailto:Alzaco-Loreno@yahooGROUPES.fr)

Edmond LUDWIG  
Prezidanto

Historique des messages												
	Janvier	Février	Mars	Avril	Mai	Juin	Juillet	Août	Septembre	Octobre	Novembre	Décembre
2013	5											
2012	10	10	6	5	15	11	7	15	15	15	14	11
2011	8	6	20	14	15	12	8	3	20	11	6	13
2010	22	14	13	11	10	8	4	3	6	8	5	5
2009	5	12	17	12	7	23	9	7	10	14	14	9
2008	9	12	3	10	10	7	7	7	8	14	8	7
2007	7	3	19	2	19	10	8	9	12	4	23	5
2006	9	11	32	18	6	9	8	20	16	7	4	4
2005	3	3	9	10	11	18	24	13	16	12	9	12
2004	2	1	14	16	48	40	4	5	9	10	10	6
2003		8	8	6		5	9		2	7	5	4

## festo de la lingvoj



Marie LIEBY, kiu kutimas agrabligi muzike la poeziajn vesperojn de la beletra fakultato de Mulhouse, kantis plurajn kantojn en ESPERANTO dum la *FESTO DE LA LINGVOJ* en la universitato de Mulhouse, la 9-an de Marto 2013. Grandega sukceso ! Interalie pro la kanzono de Jacques BREL : *Ne forlasu min !*

Ankaŭ deĵoris ĉe budo *Mulhouse-Esperanto*, kaj tute apude, *Sinjorino Sûzel PAILHES*, aŭtorino de libro pri la Katedralo de Strasburgo, inter aliaj lingvoj en Esperanto.




*E. Ludwig*

NB - el la redaktejo : la aludita libro « *Petites histoires de la cathédrale de Strasbourg* », fakte originala ilustrita albumo ( kulpas pri la ilustraĵoj *Giefem* ), estas eldonita laŭ tri versioj, ĉiu trilingva : franca, germana, angla / franca, nederlanda, japana / hispana, rusa... kaj esperanto !

Indas mencii, ke tradukis en la internacian lingvon nia senlaca agemulo André Grossmann, kaj japanlingven lia edzino Masako !

En la paĝo « *el nia fototeko* » Sûzel PAILHES.

## 21-a INTERNACIA ESPERANTO-SEMAJNO DE LA KULTURO KAJ TURISMO EN LLORET DE MAR Hispanio



**Tiu internacia semajno de Kulturo kaj Turismo estas jam tradicia ferio-semajno, kiu okazas en komenco de oktobro en Katalunio. Ĝin kutime partoprenas 120 ĝis 150 personoj. Malgraŭ ke tiam jam estas aŭtuno, tie eblas ankoraŭ ĝui la someron, la strandon, la maron kaj Esperanto-etoson.**

**En 2013 ĝis okazos en Lloret de Mar, norde de Barcelono de la 5-a ĝis la 12-a de oktobro 2013. La tuta restado okazos en en 3-stela Hotelo: GRAN HOTEL DON JUAN, str. Riera, 77 Lloret de Mar (Girona) Hispanio Aliĝ-kotizo 20 € ĝis 31.07.2011**



**poste 30 €  
Kompleta pensio en la hotelo:  
38 € en dulita ĉambro po persono kaj tago, 48 € en unulita ĉambro.**

Informoj kaj aliĝiloj ĉe:  
**<http://personales.ya.com/semajno>**  
Koresponda adreso:  
**Luis Serrano Pérez. Apartado 423. ES-08200 SABADELL Hispanio**  
Tel. (34) 93 727 50 21.  
Retadreso: **[luis\\_serrano@mixmail.com](mailto:luis_serrano@mixmail.com)**



planita migrado  
1a / 5a de julio

Jen ricevita invito :

« Mi nomiĝas Olivier BUISSON kaj estas profesie accompagnateur en moyenne montagne ( mezmontara gvidisto ) kaj nun proponas migradojn en montaro por esperantistoj [ ... / ... ].

La publiko celata por la supra migrado estas larĝa, tiom sporte kiom lingve.

- Sporte, oni normale estu kapabla iri distancon de 18 km-ojn kun altodiferenco de 800 metroj, sed la fina programo estos adaptita al la publiko kaj vetero.

- Lingve, ĉiuj, kiuj havas sufiĉan komprenon de esperanto estas bonvenaj.

Mi instruas nian lingvon per rekta metodo al progresantoj en la loka klubo, kaj scias ke tuta semajno « en esperanto » plej bone efikas por progresi.

Atentu pri la maksimuma nombro da partoprenantoj : 12 ... pro sekurecaj, leĝaj, kaj bonetosaj kialoj .

- Loĝado en la rifugejo « Sotr  » <http://www.refugedusotre.com> - 5 a  6-litaj ĉambroj, duŝejo kaj necesejo.

- Rendevuejo : montpasejo «La Schlucht ».

( NB el la redaktorejo : *la migrado la longe de la « Sentier des Roches , la plej alpeca pado de Vogezoj, certigas neforgeseblajn sencaĵojn!* )

- Ĉiujn pluajn necesaĵn informojn ( prezoj, aliĝilo ) oni ricevos per la ligilo


<http://orapado.wifeo.com/migrado-en-vogezoi.php>

Rekta kontakto anka  eblas : [obuisson@live.fr](mailto:obuisson@live.fr)



=====

Nepre a skultinda intervjuo **-en esperanto !** - de juna, plurlingva studentino germana fare de *Cyrille HURSTEL* (kun paralela franclingva traduko).



<http://blog-bilinguisme.fr/temoignage-enfant-trilingue>

*Le tour du monde des bilingues fait escale aujourd'hui en Allemagne avec l'interview d'Iris qui est trilingue, avec l'allemand et l'espagnol, mais vous constaterez que ce n'est pas forc ment le cas de ces deux langues qu'elle utilise aujourd'hui pour ses  tudes ou pour ses relations sociales.*

*Vous allez  galement d couvrir l'audace de son p re quand il a fallu r agir vis- -vis de son niveau d'anglais.*





10a / 20a de aùgusto 2013

(vidu « La Informilo »-n 160 \*\*)

2a informo

**10/08** - alveno en **SIBIU** ( ĉirkaù 17h ) ... laù elektita de propra voĝagrimedo - *buse, aùte, flugile ...*

- Transporto al **Richis (h)** – « gastig-vilaĝo », elirpunkto de ĉiuj programitaj ekskursoj

- Interkona vespero

**11/08** - malkovro de la vilaĝo kaj de la ĉirkaùajo

Loko-historio - « *akvo-servo ĉe la fontano* »... ( efika trinkaĵo ! ) - vesperdebato *sin nutri sane* ( Lydia )

**12/08** - vizito de la mezepoka urbo **MEDIA (h)** - ( turism-oficejo + enurba *ezoterika* itinero gvidata de Catherine ) - sendo de plurlingva, internacia mesaĝo !

**13/8** - restado en la montaro ( tranoktado en rifuĝejo - sportemuloj povos grimpi pli alten )

**14/8** - reveno al Richis(h)

**15/8** - « ripoz-tago » kun promenado ĝis **BIERTAN** ( 5km )

**16/8** - vizito de la urbo **SIGHIS(h)OARA** ( turism-oficejo + specifa vizito de la malnova preĝejo kun Catherine )

**17/8** - **MOS(h)NA**, apuda vilaĝo, kun malkovro de fromaĝejo

**18/8** - **SIBIU**, urbo kiu meritas 2 tagojn da malkovro ( ebleco tranokti plue antaù reveno al RICHIS (h) )

lom pli pri la restado

- Loĝejo ĉe la gastig-familioj aù en pensiono
- Komuna kuirado kaj manĝo dank' al la produktoj de la gastigantoj
- Malkovro de la lokaj bestoj kaj plantoj
- Riĉaj vesper-aranĝoj ( kantoj, muzikaĵoj, ktp ... )

GRAVE : limigita nombro de partoprenantoj ... **15** homoj

Tarifo : de **310 €** ĝis **410 €** laù la elektita tranoktado

Antaùpago : **50 €**

Ĉeko je la nomo *Association Gradinitza Esperanto Turismo*

\*\* franclingva programo kaj eventualaj pluaj informoj ( maniero pagi por alilandanoj ) ĉe Lydia :

**Lydia BLOCH** 11, rue des Ducs, **FR 55000 BAR-le-DUC** - tel. **03 29 77 19 42** - [lydiabloch@wanadoo.fr](mailto:lydiabloch@wanadoo.fr)

---

## Rumanio – Aliĝilo

Nomo kaj antaùnomo :


Adreso ( kun lando ) :

Ret-adreso :

Tel. :

Dato :

Subskribo :

**15 - 19. aprilo**

Lingvokursoj sur unua- kaj duagrada niveloj - en *Kvinpetalo*, Bouresse, Francio. Inf. *Kvinpetalo*, Esperanto-Centro, 4 rue de Bureau, FR-86410 Bouresse, Francio. Tel.: +33(0)549034314, rete. [informoj@kvinpetalo.org](mailto:informoj@kvinpetalo.org)

**20 - 27. aprilo**

3-a PRINTEMPAS - en Greziljono, Baugé, Francio. Intensaj kursoj en 3 niveloj kaj internaciaj KER-ekzamenoj B1, B2, C1. Inf.: *Esperanto-kastelo Greziljono*, Château de Grésillon, FR-49150 Saint Martin d'Arce, Francio. Rete: [kaste-lo@gresillon.org](mailto:kaste-lo@gresillon.org)

**22 - 26. aprilo**

Staĝo pri tradukado kaj preparado al atesto pri supera lernado kun *Brian Moon* - en *Kvinpetalo*, Francio. Inf. *Kvinpetalo*, Esperanto-Centro, 4 rue de Bureau, FR-86410 Bouresse, Francio. Tel.: +33(0)549034314, rete. [informoj@kvinpetalo.org](mailto:informoj@kvinpetalo.org)

**27. aprilo - 1. majo**

3-a PRINTEMPAS bis - en Greziljono, Baugé, Francio. Seminario pri interkultura komunikado kun Radojica Petrović el Serbio. Inf.: *Esperanto-kastelo Greziljono*, Château de Grésillon, FR-49150 Saint Martin d'Arce, Francio. Rete: [kaste-lo@gresillon.org](mailto:kaste-lo@gresillon.org)

**29. aprilo - 3. majo**

Malkovro de la regiono Puatuo kun *Catherine Kremer* kaj *Brian Moon* - en la Kulturcentro *Kvinpetalo*, Bouresse, Francio. Inf. *Kvinpetalo*, Esperanto-Centro, 4 rue de Bureau, FR-86410 Bouresse, Francio. Tel.: +33(0)549034314, rete. [informoj@kvinpetalo.org](mailto:informoj@kvinpetalo.org)

**4 - 11. majo**

FRINGOJ por infanoj - en Greziljono, Francio. Ferio-semajno por infanoj 8-17 jaraj, akompanataj de siaj instruistoj aŭ gepatroj. Inf.: *Esperanto-KulturDomo*, Château de Grésillon, FR-49150 Saint Martin d'Arce, Francio. Telefono-respondilo : +33-2.41.89.10.34, Rete: [kastelo@gresillon.org](mailto:kastelo@gresillon.org)

**4 - 11. majo**

65-a Kongreso de IFEF kaj de UFE en *Artigues* apud Bordeaux, Francio. Temo: Rolo de la fervojoj en disvolviĝo de la moderna mondo. Inf.: AFCE, 9 rue de Château-Landon, Fr-75475 Paris (10), Francio. Rete: [jeanripoche@wanadoo.fr](mailto:jeanripoche@wanadoo.fr)

**8 - 11. majo**

Kongreso de Esperanto-France kaj de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF) - en *Artigues*, apud Borozo, Francio

**9 - 12. majo**

67-a Kultura Semajnfino de *Sarlanda Esperanto-Ligo* kaj *VerdeVivi* - en *Homburgo/Saar*, Germanio. Seminarioj pri *Andreo Cseh* kaj *Vikipedio*. Prelegos *Ed Borsboom* kaj d-ino *Ursula Niesert*. Okazos i.a. ekskursoj al BMI kaj *SaarVital* en la bela urbo *Blieskastel*, libroservo, diservo, filmvespero kaj internacia vespero. Inf.: *Sarlanda Esperanto-Ligo* r.a., Alter Hangarten 2, DE-66440 Blieskastel, Germanio. Rete: [sel@esperanto-reto.eu](mailto:sel@esperanto-reto.eu)

**11. majo**


BAVELO-Migrado - en *Achern*, Germanio. Tuttaga migrado en la bela naturo de la Nigra Arbaro, ĉi-jare laŭ geologia roko-vojo. Inf.: *Baden-Virtemberga Esperanto-Ligo (BAVELO)*, rete: [migrado2013@esperanto-bw.de](mailto:migrado2013@esperanto-bw.de)

**17 - 20. majo**

90-a Germana Esperanto-Kongreso - en *Nürnberg*, Germanio. Kongreso de GEA kaj festo okaze de la 125-a jubileo de la *Nuernberga Esperanto-grupo*. Inf.: *Esperanto-Nürnberg* (*Sabine Hauge*), Moritzbergstr. 37, DE-90482 Nürnberg, Germanio, [esperantonord@googlemail.com](mailto:esperantonord@googlemail.com)

**23. junio**

Koncerto de Interkant': *Karmen* - en la Kulturcentro *Kvinpetalo*, Bouresse, Francio. Inf. *Kvinpetalo*, Esperanto-Centro, 4



## en marge du second congrès universel d'espéranto à Reykjavik

"Það er kominn tími til að þjóðir heimsins átti sig á að hlutlaust mál getur orðið skjaldborg menningar þeirra gegn einræðislegum menningaráhrifum einnar eða tveggja tungna sem verða æ augljósari um þessar mundir. Ég óska þess innilega að Esperanto eflist sem fyrst svo það verði fært um að þjóna öllum þjóðum heimsins."

Vigdís Finnbogadóttir, forseti Íslands frá 1980–1996.

« Il est temps déjà que les diverses nations comprennent qu'une langue neutre pourra devenir pour leurs cultures un véritable rempart contre les influences monopolisatrices d'une ou deux langues seulement, comme ceci apparaît maintenant toujours plus évident.

Je souhaite sincèrement un progrès plus rapide de l'espéranto au service de toutes les nations du monde ».

Vigdís FINNBOGADOTTIR, ancienne présidente de la République d'Islande



« Une langue facile à apprendre comme l'espéranto permet une solution neutre du problème linguistique. On apprend plus facilement une seconde langue étrangère que la première. L'effet d'une seconde langue est si fort, et l'espéranto est si facile, qu'il est plus favorable d'apprendre l'espéranto en premier, et ensuite une langue nationale, plutôt que cette langue étrangère seule. C'est scientifiquement prouvé par des tests scolaires.

« Quelques pays pourraient d'abord faire un traité sur l'enseignement scolaire de l'espéranto. On pourrait ensuite étendre le traité aux autres pays ».

Professeur Reinhard SELTEN, prix Nobel d'économie 1994, le 9 mai 2007 lors d'un accueil au Parlement européen, à l'occasion de la journée de l'Europe.

## klubo de veteranoj ... en facebook !

Al la Esperanto-organizaĵoj en *Facebook* aldoniĝis ankaŭ *Veterana Esperantista Klubo, VEK*.

De multaj jaroj ĝia aktiveco limiĝis al neregulaj kunsidoj en Universalaj Kongresoj, sed nun *Facebook* donas la eblon de konstanta komunikiĝo inter tiuj veteranoj, kiuj ĉeestas tiun socian retejon.



VEK estas klubo por esperantistoj, kiuj lernis la lingvon *antaŭ minimume 40 jaroj*. Aliĝpeton oni povas sendi rete al [vek@co.uea.org](mailto:vek@co.uea.org) aŭ paperpoŝte al la Centra Oficejo de UEA, kun mallonga priskribo pri sia esperantistiĝo aŭ eĉ pli ampleksa rakonto pri sia esperantista agado.



Membreco estas senpaga, sed oni povas pagi libervolan koti-zon al la UEA-konto de VEK (vekx-k). La kotizo egalas al tiu de *Membro kun Gvidlibro* de UEA laŭ la tarifo por la koncerna lando.

La grupo estas fermita, t.e. nur la membroj povas afiŝi kaj legi mesaĝojn en ĝi.

## Universala Esperanto-Asocio (UEA)

Justa komunikado - Communication équitable



En 2013 les locuteurs de l'espéranto font campagne pour une justice linguistique sous le slogan « Communication équitable », en relation avec le 98<sup>ème</sup> Congrès Universel de l'espéranto qui se tiendra sur le même thème dans le prestigieux *Centre Harpa* de Reykjavik, en Islande, avec la participation de quelque 1000 participants de plus de 50 pays.



Après une courte période de 125 ans, l'espéranto se trouve actuellement parmi les 100 langues les plus utilisées, sur les 6800 idiomes parlés de par le monde. Sur le site de *Wikipédia*, il arrive en 30<sup>ème</sup>


position parmi 285 langues ( 11 février 2013 ). Il se trouve aussi parmi les langues retenues par *Google*, *Skype*, *Firefox*, *Ubuntu* et *Facebook*. *Google translate* l'a récemment ajouté à sa liste de 64 langues. De même les téléphones mobiles digitaux peuvent aujourd'hui utiliser l'espéranto .

Selon le livre les événements dans le monde, édité aux Etats-Unis par la CIA, il y a de nos jours plus de personnes qui parlent l'espéranto que l'islandais. L'espéranto est enseigné officiellement dans 150 universités et autres instituts d'enseignement supérieur, ainsi que dans quelque 600 écoles élémentaires et secondaires dans 28 pays. Sa littérature comporte plus de 50 000 titres et chaque semaine sont édités de nouveaux ouvrages littéraires. Il existe aussi des émissions radiophoniques *podcast* dans plusieurs pays, sans compter « *Radio Muzaiko* » qui émet 24 heures sur 24, et un programme télévisé en Chine sur *Internet*.

La diffusion de l'espéranto est freinée par le manque de connaissances objectives sur le sujet, ainsi que par bien des préjugés. Sans compter les persécutions dont furent victimes ses locuteurs, par exemple sous Hitler et Staline ; tous deux ont disparu, mais l'espéranto est resté, a évolué et, actuellement, il est activement utilisé comme moyen de communication interethnique, interculturel, par des milliers et des milliers de personnes dans plus de 100 pays sur tous les continents.

L'UEA ( Universala Esperanto-Association / Association Universelle d'Espéranto ) a des relations officielles avec l'UNESCO et les *Nations Unies*, de même qu'avec le Conseil de l'Europe. L'espéranto permet une communication interethnique neutre et un niveau de discussions, d'intercompréhension équitable, respectant ainsi les droits des minorités et des langues autochtones, et traitant tous les idiomes sur le même pied 'égalité et en respectant les diversités





Nia samideano Bruno HENRY el NILVANGE ( FR 57240 ) entreprenis vojaĝon tra Ĉinio, kie hejmas lia korespondantino ZHANG, ankaŭ dungita ĉe la ĉina fervoj-kompanio.

Li ĵus malfermis blogon, en kiu li komencas raporti pri siaj travivaĵoj.

Niaj legantoj malkovros -momente en franca lingvo- tekstojn kaj okulfrapajn fotojn, alklakante la retejon

<http://brunoh.olympo>

## CHANGSHA 14/02/2013 au 19/02/2013



« ...Chaque jour nous rendons visite aux amis et aux cousins de Zhang avec qui nous buvons le thé, boisson favorite des chinois. Ils partagent leur repas avec nous. Toujours très hospitaliers, ils s'occupent toujours du bien-être de leurs invités. Souvent, je suis reparti avec en cadeau une boîte de très bon thé. Nous avons aussi rendu visite à une professeur de langue étrangère, polyglotte, parlant le russe, l'anglais et le français, avec laquelle j'ai pu converser. Elle a exercé son métier à Moscou et en Chine. A la retraite, elle traduit des poèmes chinois en russe qui sont édités.

A la campagne, en périphérie de Changsha, des villageois, sur notre chemin nous ont invités à boire le thé. Sur le mur de la pièce principale s'affiche un portrait du président Mao. L'ameublement est très rudimentaire. Les gens sont pauvres. Ils cultivent des légumes dans les jardins aux alentours pour leur besoin et en vendent aux citadins.

Nous sommes allés en ville faire des courses et manger au restaurant. Dans un restaurant de nombreuses serveuses présentent une multitude de plats aux centaines de clients qui choisissent sur des petits chariots. La ville paraît riche, vu le nombre de boutiques de mode en tous genres, de grand magasins, de galeries commerciales clinquantes, d'enseignes lumineuses et d'écrans publicitaires gigantesques. Le développement ici est exponentiel. La ville semble nouvelle, et le métro est en construction. Mais les pauvres sont encore nombreux ici.

Les pétards du printemps chinois éclatent encore de temps en temps dans notre paisible quartier, loin du tumulte et du brouhaha de la ville... ».

## ... originale informi pri esperanto ! ...

**BRAVO !!!**




Famas ĉe francaj radio-elsendaĵoj la tiel nomata « ludo de la 1000 eŭroj ». Demandoj pli kaj pli cerbumigaj estas proponitaj al la kandidatoj.

La 15an de februaro, alfrontis kun partnero la solvendajn « enigmojn » Jacky RAMON, ekpiloto de la supersona aviadilo « Concorde » ... kaj plue prezidanto de Esperanto-Arras.

Li trafe kaptis la okazon por aludi la internacian lingvon antaŭ la loka homamaso, sed ankaŭ paralele per radio al vasta aŭskultantaro !

Brile respondis la du kandidatoj, kiuj senvualigis la enigmon kaŝitan en la lasta demando, kaj gajnis 1000 € !

Tutcerte ankaŭ scivolemas niaj legantoj... Kiel nomiĝis la « kosmo-ŝipo » per kiu Juri Gagarin ĉirkaŭflugis la Terglobon la 12an de aprilo 1961 ? - Temas pri « Vostok 1 »...





El Pollando : <http://retradio.posterous.com/>

Tuj kiam mi eklernis Esperanton mi trejniis min al komprenado de la parola lingvo per aŭskultado de Esperanto-radioj, kaj tiam ĉefis la aŭskultado de la ĉiutagaj elsendoj de Pola Radio, kies profesiecon neniu ajn povis dubigi. Unue mi aŭskultis pere de la mallongaj ondoj (malgraŭ la foja malbonega aŭdebleco), poste persatelite, kaj aktuale je iu ajn momento de la tago *per la komputilo*.

Post la ĉesigo de la oficialaj elsendoj fare de la pola ŝtato, grupo da ĵurnalistoj de la redakcio decidis, kun la helpo de plurnaciaj fakuloj pri informadik, krei ret-radion, kiu nun proponas dufoje semajne elsendojn de dudeko da minutoj. Kompreneble la pri-polaj temoj nun bedaŭrinde malplias, sed la elsendoj kun tre interesaj Esperanto-temoj daŭre restas profesinivelaj kaj lingve modelaj.

El Ĉinio: <http://esperanto.cri.cn/>

De tempo al tempo mi ankaŭ aŭskultis la ĉinan radion en esperanto. Unue per la mallongaj ondoj kaj nun *komputilo*. Mi konfesas, ke dum longa tempo la rigida prezentomaniero ne tre allogis, sed la novaĵ-bultenoj laŭforme ĉiam perfektis kaj daŭre perfektas.

De kelkaj jaroj plijuniĝis la redakcia skipo, kaj plenkoloraj retpaĝoj invitas al malkovro de Ĉinio pere de daŭre novaj temoj, kaj se vi klakas al **E-klubo**, vi malkovros aregon da elsendoj pri-esperantaj kun multaj fotoj kaj intervjuoj. Vi klaku sur la bildigitan aŭskultilon kaj aŭskultu !


Antaŭ iom da tempo aperis ĉiusemajna diverstema babilumado inter du entuziasmaj junaj geĵurnalistoj, kio konsistigas ĝis nun neoftan specon de elsendo.

El ESPERANTUJO: <http://muzaiko.info/>

Kaj jen la plej mojosa, la plej esperantista, la plej juna kaj juneca, kun mozaiko da muziko kaj informoj, tatnokte ! Mi ne priskribos : mi invitas vin al malkovro ! Abundas la elsenderoj !

Radioaŭskulte via !  
Edmond LUDWIG

**voĉlega programo ankaŭ por Esperanto !**



La komputila teknologio evoluas tre rapide ankaŭ en lingva tereno. Inter similaj aliaj projektoj, jen aperis programo, kiu kapablas laŭtleĝe skribitan tekston en 32 lingvoj, inter ili **ankaŭ en Esperanto**.

Kvalito de prononcado ankoraŭ varias ĉe diversaj lingvoj. La Esperanta versio estas ankoraŭ mankohava, sed ekzemple la hungara estas surprize tre bona, normale uzebla.

Senpaga test-versio de tiu ĉi voĉlega programo estas provebla ĉe: [http://www.oddcast.com/home/demos/tts/tts\\_example.php?var=1](http://www.oddcast.com/home/demos/tts/tts_example.php?var=1)

Ĉe pluraj lingvoj oni povas elekti inter la paroluloj, oni povas elekti ĉu parolu viro aŭ virino, kaj oni povas aldoni diversajn efektojn (ekzemple oni povas rapidigi aŭ malrapidigi la parolfluan).

La programo estas vere impresiga, kaj instigas pensi pri baldaŭa estonto de lingva situacio:

1. voĉ-rekonaj/skribaj programoj,
2. maŝina tradukado,
3. tekstolegaj programoj ... por ĉiu laŭ sia gepatra lingvo

Jam de pluraj jaroj la *Kolekto por Planlingvoj* kaj *Esperanto-muzeo* de la Aŭstria Nacia Biblioteko kontinue skanas kaj enretigas malnovajn Esperanto-gazetojn por faciligi la aliron al tiuj historiaj fontoj. Sekve jam 25 diversaj gazetoj estas senpage legeblaj pere de la retejo de Esperanto-muzeo. Oni ne devas ie registriĝi, sed nur alklaki la lig-ilon de la dezirata gazeto, kaj tuj oni povas foliumi kaj legi ĝin.

La plej malnova gazeto estas la unua numero de „*La Esperantisto*” el la jaro 1889, la plej nova gazeto estas la sesa numero de "*Esperanto. Internacia Revuo eldonata de Universala Esperanto-Asocio*" el la jaro 1946.

En 2013 sep pliaj gazetoj estis aldonitaj:

- *L' Amerika Esperantisto* (1906-1931)
- *Kataluna Esperantisto* (1910-1936)
- *La Revuo Orienta* (1920-1940)
- *La langue auxiliaire* (1898-1914)
- *International language* (1924-1931)
- *Belga Esperantisto* (1908-1940)
- *Verda Mondo* (1925-1935)



La tuta listo de la skanitaj gazetoj estas rigardebla, alklakas la ligilon "skanitaj revuoj" (aŭ "*Gescannte Zeitschriften online*" aŭ "*Esperanto-journals*") en la retejo de la Esperanto-muzeo. Pli rapida eblo atingi la liston estas la jena ligilo: <http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/19056.htm>

Indas regule viziti la liston, ĉar daŭre aldoniĝas novaj skanitaj gazetoj!

kiam oni  
"Scanned"

Internacia Esperanto-Muzeo en Wien, IEMW  
Palais Mollard, Herrengasse 9, AT-1010 Wien, Aŭstrio  
Tel.: (+43 1) 534 10-730  
Retpoŝto: [bernhard.tuider@onb.ac.at](mailto:bernhard.tuider@onb.ac.at)  
Retejo: <http://www.onb.ac.at>

Mag. Bernhard Tuider

## 4401 SCIENCAJ KAJ FAKAJ VERKOJ EN ESPERANTO !

Por ricevi sian *universitatan diplomon*, studentoj en Hungario devas fari ankaŭ ekzamenon pri iu fremda lingvo.

En baza, bakalaŭra nivelo en multaj universitatoj, ankaŭ Esperanto estas akceptata, sed en mastera grado (*msc*) -laŭ pasintjara leĝo- oni akceptas nur tiujn lingvojn, en kiuj pruveble ekzistas *sciencia kaj faka literaturo*.

Por helpi la studentojn de la koncernaj fakoj, en *la Esperanto-Centro Eventoj*, ni kompilis libro-liston pri fakaj verkoj kaj sciencaj libroj eldonitaj aŭ aperintaj en Esperanto, nekonsidere ilian nunan aĉetebledon.

Nia listo enhavas **4401 elementojn** de la sekvaj fontoj :

- ĉiuj materialoj de *STEB* ( **Sci**enca kaj **T**eknika **E**-Biblioteko ) ĉe [www.eventoj.hu](http://www.eventoj.hu)
- libroj en *la libroservo de UEA*, en kategorio scienco kaj tekniko
- libroj kun sciencia kaj teknika enhavo, en *la katalogo de Kolektaĵo Fajsz*
- artikoloj el *Sciencia Revuo* en retejo ĉe *Eventoj*
- artikoloj el la sciencia revuo *Télescope*
- artikoloj el *Jura Revuo*
- listo pri aperintaj vortaroj en *la retejo de UEA*
- enhavo de la verko "Fakverkoj" de *Miroslav Malovec*
- librolisto en broŝuro de *Rátkai Árpád* pri faka aplikado ktp...

Ni konscias, ke la listo tute ne estas kompleta; nia celo estis nur helpi la juran agnoskon de Esperanto en hungaraj universitatoj.

La kolektaĵo estas atingebla ĉe la adreso:

<http://www.eventoj.hu/sciencverkoj>

La unua fazo estas rezulto de plurmonata laboro. Se iu volas daŭrigi kaj kompletigi la materialon, volonte ni transdonas la fontan *xls-dosieron*.

Ni ĝojas, se ni povu helpi al la prestiĝo de Esperanto.

*Szilvasi Laszlo* kaj *Mészáros Ivan*,  
La kompilintoj.



... *Diplomita en Esperanto !...*



## Naskiĝo de impresionismo

## Ĉefe rilate al Claude Monet

La 15an de aprilo 1874 en Parizo, impresionistoj okazigis la unuan ekspozicion en studio, antaŭe uzata de konata fotisto Nadar. Ili ekspoziciis siajn pentraĵojn. En la pentraĵaro troviĝis la fama pentraĵo *"Impreso, sunleviĝo"* (1873) (Fig.1) pentrita de franca oleopentristo Claude Monet (1840~1926). Ĉi tiu verko estas signifo-plena, se oni volas kompreni la historion de impresionismo.

De proksime oni povas konstati multajn ruĝajn malgrandajn tuŝojn, kiuj esprimas rebrilojn de la suno en la akvo de la maro. De malproksime la tuŝoj estas ne videblaj pro la distanco, kaj oni perceptas la ondojn de la maro dank' al aro da oblongaj ruĝaj tuŝoj. Du ŝipetoj kun ties remistoj siluete flosas sur la maro en nigreca koloro pro kontraŭlumo. La aliaj ŝipoj kaj la feraj armaturoj estas en blua silueto sur la fono de la pentraĵo. Ĉio estas vualita de densa nebulo. Nur la ronda kaj malgranda suno hele brilas kun klara ruĝa koloro kaj prilumas suprajn nubojn. Ĉi tiu verko temas pri *la haveno de Le Havre* en nord-okcidenta Francio, kie pasigis sian junecon la estonta revoluciisto de pentrado.

Kiam li preparis sin por elekti siajn ekspoziciindajn verkojn, li proponis al la frato de Renoir, kiu redaktis katalogon, la verkojn kun tro similaj titoloj, ekz. *"La enirejo al vilaĝo"*, *"Ekiro de vilaĝo"* kaj *"Vilaĝa mateno"*. Ĝis tiam la titolo de koncerna pentraĵo havis nur vorton "Sunleviĝo".

La redaktoro taksis, ke tio estas banala titolo kaj petis lin titoli alimaniere tiun pentraĵon por aperigi ĝin en la katalogo. Li tuj proponis, ke la kunlaboranto aldonu la vorton *"Impreso"*. La postan jaron, Monet rakontis, ke li ne deziris titoli tiun verkon *"Pejzaĝo de Le Havre"*. Kial li ne deziris titoli kun la nomo de lia hejmurbo tiun koncize pentritan verkon? Laŭ iuj opinioj, Monet timis, ke la spektantoj ne rekonos la pentraĵon kiel la pejzaĝon de Le Havre. Laŭ mia opinio li antaŭsciis, ke tiu pentraĵo kvazaŭ tuja skizo kaŭzos multajn kritikojn fare de kritikistoj pri belarto pro la nova pentro-maniero. Do, li ne deziris doni la titolon, kiu enhavas la loknomon de lia hejmurbo, al la kritikota pentraĵo.

La vorto *"Impreso"* en la titolo de tiu pentraĵo elvokas tion, ke pentristoj, kiuj okazigis tiun ekspozicion, estas nomataj impresionistoj, ekde la kritiko fare de ĵurnalisto pri belarto *Leroy*. La konversacio en lia kritiko inter fikcia akademieca pentristo *Vincent* kaj "mi", kiuj rondiras en la ekspoziciejo:

- Ho! Jen!- li kriis antaŭ la 98a pentraĵo.
- Mi konas ĉi tiun pentriston. Tiu ĉi pentristo tre plaĉas al Vincent. Pri kio temas ĉi tiu pentraĵo? Vidu la katalogon.
- La titolo estas *"Impreso, sunleviĝo"*.
- "Impreso"*. Ankaŭ mi tiel pensis. Mi deziris tuj diri tion. Ĉar mi sentis impreson vidante ĉi tiun pentraĵon, la pentraĵo devas enhavi ĝin. . Kiel libere kaj senceremonie li pentris ĝin! Tapeto ankoraŭ pentrata estas eĉ pli preta ol ĉi tiu pentraĵo de la maro!




Fig.1 Claude Monet "Impreso, sunleviĝo"(1873)

Post la apero de tiu ĉi kritiko en ĵurnalo multaj kritikistoj malestime ekuzis la vorton *"Impreso"* kiel titolon de sia kritiko pri tiu ekspozicio. Estas interese, ke la nomo de la skolo *Impresionisto* naskiĝis de la kritikoj kaj mokoridoj.

La fekunda pentristo ekspoziciis 5 oleopentraĵojn kaj 7 paŝtelojn en la unua ekspozicio. Unu el la oleopentraĵoj, kiu nomiĝas *"Lunĉo"* (1868~69) (Fig.2) estas pentrita laŭ la akademieca pentro-maniero: konturo, klar-obskuro kaj perspektivo. Krome tiu malnovtipa pentraĵo estis pentrita 6 jarojn antaŭ tiu ekspozicio. Kial li aldone ekspoziciis tiom malnovan pentraĵon? Oni opinias, ke lia celo estis altiri atenton de la spektantoj al siaj novaj pentraĵoj meinte ilin kun la malnovaj. Alia opinias, ke ili celis kolekti ĉiujn spektantojn, kiuj interesiĝas pri diverstipaj pentraĵoj. La lasta opinias, ke Monet deziris, ke la spektantoj rekonu la veran valoron de tiu malnova verko, kiu estis rifuzita de Salono en 1870. Laŭ mia opinio, li deziris montri al la spektantoj sian kapablon fari pentraĵojn kaj laŭ la moderna, kaj ankaŭ laŭ akademieca maniero.

